

# EKO 2023



Nia aganto pri  
instruado kaj  
progreso

**Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro**

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**



**EKO 2023 / 71. Decembro 20, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Frank Lappe.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alkroĉaĵoj: 5KVIZ? KB. Sume: KB ??.**

## Aruŝa altiras ĉiam pli da aliĝoj

En la 20-a de decembro aliĝoj por Aruŝa kreskis ĝis 202 personoj el 42 landoj: Germanio 25, Ĉinio 16, Tanzanio 15, Francio 17, Brazilo kaj Usono po 11. Memoru, ke jarŝanĝe altiĝas la kongresa aliĝo, do tra la festotagoj nepre konsideru la aliĝon kaj vojaĝadon al Tanzanio!



Ĉiuj fotoj: SMG

## Homaj Rajtoj eterne gravas

Deklaro de la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj. Do, (CED) okaze de la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la 10-an de decembro, 2023, CED atentigas pri la fundamenta rolo de lingvo en la difino, protektado kaj antaŭenigo de la universalaj homaj rajtoj.

La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj eksplicite malpermesas diskriminacion bazitan sur lingvo koncerne ĉiujn rajtojn listigitajn en la Deklaracio. Ĉi tiuj inkluzivas egalan protekton sub la leĝo; preventadon de arbitra enmiksiĝo kun privateco, familio, hejmo aŭ korespondado; liberecon de esprimo (inkluzive de la rajto serĉi, ricevi kaj transdoni informojn kaj ideojn per iu ajn komunika rimedo kaj sen konsidero al landlimoj); egalan aliron al publikaj servoj en la propra lando; kaj la ekonomianj, sociajn kaj kulturajn rajtojn esencajn por persona digno kaj libera personeca evoluo. Aldone, la Deklaracio agnoskas la prioritaton de gepatroj en la elektado de la speco

de edukado provizotaj al iliaj infanoj. Tamen restas tiel, ke lingvo ofte estas la bazo por neegalaj rekono kaj protekto de homaj rajtoj de individuoj. Parolantoj de minoritataj lingvoj pli verŝajne spertas neadon aŭ limigon de tiuj rajtoj surbaze de lingvo.

Dum la Deklaracio restas mejloŝtono en la evoluo de universalaj homrajtaj normoj, multo restas farenda. Estis ripetaj kaj oftaj alvokoj por plifortigitaj iniciatoj de Unuiĝintaj Nacioj por plibonigi la agnoskon kaj protektadon de minoritataj homaj rajtoj, pro la malboniĝantaj kondiĉoj rilate al homaj rajtoj spertataj de multaj minoritataj grupoj tutmonde. Subtenante tiajn klopodojn, ekzemple la Projekton de Tutmonda Konvencio pri la Rajtoj de Minoritatoj, ni krome emfazas, ke lingvaj homaj rajtoj ankaŭ postulas la enkondukon, en ĉiu jurisdikcio, de inkluzivaj, egalecaj lingvaj politikoj, kiuj devus esti regule kontrolataj kaj taksataj.

Ĝisdataj komentarioj kaj rekomendoj por plifortigi la efektivigon de lingvaj homaj rajtoj estis prezentitaj kaj diskutitaj de diversaj internaciaj fakuloj, inkluzive de akademiuloj kaj reprezentantoj de la civila socio en la 9-a Nitobe-Simpozio, organizita de CED en la Universitato de Torino, Italio, 28-29 julio 2023. Videoresumo de la simpozio estas havebla ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=37YtQlxnO48>

Sendis Michele Gazzola, nome de UEA, EDE kaj TEJO

## Rusio rekonas ĉinan meritulon

La 15-an de decembro 2023, je la Zamenhof-Tago estis proklamita de la Ondo la rezulto de la elektado de la esperantisto de la Jaro 2023. La honoran titolon ĉi-jare ricevis **Sun Minĝiao (Semio)**, 59-jara ĉina esperantisto, iniciatinto de la Internacia Esperanto-muzeo en Zaozhuang. Gratulojn al la laŭreato! Legu en 'La Ondo de Esperanto' ĉe <https://sezonoj.ru/2023/12/jaro-7/>



## Nova Esperanto-Kurso en Pakistano

La dusemajna vintra Esperanto-kurso komenciĝos la 18-an de decembro 2023, kaj finiĝos jarfine, tamen por tiuj, kiuj ŝatus plu lerni Esperanton, ĉi tiu vintra kurso aŭtomate konvertiĝos al la 3-monata baza kurso de Esperanto kiu daŭros ĝis marto 2024. La kurso organiziĝos en kunlaboro kun Nankana Sahibo/Pakistano kunlaborante kun la Centro por Modernaj Lingvoj, Nankana-Sahibo. La kurson gvidos la subskribinto.

Adeel Mahmood Butt, Reprezentanto de ILEI en Pakistano

## Jen artikoloj aperintaj en la blogo ESF Connected:

- Patricia Egan: Ralph L. Harry - Vivo de Diplomatio, Homaj Rajtoj, kaj Lingva Egaleco ĉe Unuiĝintaj Nacioj: <https://esfconnected.org/2023/12/09/ralphlharry-eo/>
- Magda Madany-Saá: "kontraŭ" kaj "por" Malkolonieco en anglalingva instruado <https://esfconnected.org/2023/09/30/kontrau-kaj-por-malkolonieco-en-anglalingva-instruado/>
- Bernhard Tuidar: Nova aŭdgvidilo por la Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: <https://esfconnected.org/2023/06/30/nova-auxdgvidilo/>

## Korea kurso

La redaktoro de <[edukado.net](https://edukado.net)> informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Bonghwang elementa lernejo

Gvidantonomo: Ella. Aldoninto: kih4860

Tipo: Nova lerneja kurso

Loko: Gimhae, Respubliko Koreio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27601>

## La Zamenhofa festo en Brazilo



## La 14-a Internacia Himalaja Renkontiĝo

Nepala Esperanto-Asocio ĝojas anonci la 14-an Internacian Himalajan Renkontiĝon 2024 por konigi sian landon al alilandaj esperantistoj. Apenaŭ ekzistas iu lando en la mondo kiu povus rangi samnivele kun Nepalo rilate al natura, lingva, etna kaj kultura diverseco. Ni bonvenigas homojn kiuj volas eklerni Esperanton dum la Renkontiĝo. La programo estas planita por ke ĝi taŭgu al ĉiuj aĝgrupoj. Dum via restado, vi loĝos en bonkvalita hotelo en Katmanduo kaj en komfortaj gastejoj aŭ tendoj dum la piedvojaĝo. Ĉiuj manĝokostoj kaj aliaj kostoj estas inkluzivitaj en la aliĝkosto, sed ne asekuro. Multaj niaj servoj estas faritaj de nepalaj esperantistoj.

Vi pasigos la unuajn kaj lastajn tagojn de la Renkontiĝo en la valo de Katmanduo. Ĝian riĉan kulturen pasintecon atestas la tieaj historiaj distriktoj kaj monumentoj, notindaj tiuj de la plej grandaj urboj: Katmanduo, Bhaktapuro kaj Patano. Tie vi povos vidi kiel hinduoj kaj budhanoj restas fidelaj al siaj jarcentaj tradicioj malgraŭ la multflanka moderniĝo de la valo. La ĉefa parto de la Renkontiĝo estos en la regiono je preskaŭ 300 kilometroj nordokcidente de la valo de Katmanduo. Dum la marŝado vi trapasos lokojn plenajn de vidindaĵoj, inkluzive Pokhara (la plej fama turisma loko), Kade, *Forest Camp* (arbara kampo), *High Camp* (la plej alta kampo). Ĉe la horizonto estos mondfamaj mont-irceloj de Nepalo, kreantaj majestajn vidojn de Himalajo.

La piedvojo tie estas kovrita de arbaro kaj punktita de sovaĝaj floroj kaj specioj de rododendro, la nacia floro de Nepalo. Vi ĝuos vidojn de nigraj simioj, cervoj kaj moskuloj, kaj pli ol 250 specioj de montaraj birdoj. La pintoj de Annapurna, ekzemple Annapurna Sudo (7219 m), Annapurna II (7937 m), Annapurna III (7555 m), Annapurna IV (7525 m) kaj la Fiŝovosto (Machhapuchhare) (6997 m) iĝos videblaj ekde la tago de la marŝado.

Kotizo: € 1050 eŭroj por 12-taga ekskurso, restado en bonkvalita hotelo, tri manĝoj ĉiut-age, enirpagoj en diversaj lokoj kaj transportado.

Koncizigo de teksto sendita de NespA.

## Kongo DR festis plurlingve pri homaj rajtoj

La 10-an de decembro 2023, memortagon de la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, DKEA organizis ceremonion. La UEA-mesaĝon legis france s-ino Fidélie Kanjinga, angle prezidanto Guy Roger Iлека kaj esperante s-ro Lungikisa Sumbu Jean Pierre, eksprezidanto de DKEA kaj reprezentanto de UEA ĉe la Unesko-Komisiono en DR Kongo. La ceremonio estis gvidata kune fare de prezidanto Guy Roger Iлека kaj Kultura Konsilanto Paul Alcée Mazangu. Iom antaŭ la fermo de la aranĝo, s-ro Lungikisa Sumbu Jean Pierre okazigis klason en la lingvo Esperanto por ĉiuj partoprenantoj. Ĉiuj partoprenantoj tutkore esprimis dankon al la Komitato de DKEA, kiu ne ŝparis penon por organizi aktivadojn dum malfacilaj tempoj kaj per disponeblaj rimedoj. La dua vicprezidanto Arlain Kizeyidioko Mayinda partoprenis la ceremonion. De sia hospitala lito, sinjoro Mafuila Mavomo Jackson fervore sekvis la eventon kiel Ĝenerala Sekretario de DKEA.

## Resumo pri sumoo

La 84a Internacia Esperanto-Sumoo finiĝis. La projekto havas ĉ. 300 partoprenantojn kaj havas grandan influon al la progreso de la Eo-Movado. Ili aĉetas librojn, legas ilin, altigas sian kapablon kaj progresigas solidarecon. En la periodo de 2009 ĝis nun la plej legemaj partoprenintoj venas el Japanio, Francio, Brazilo, Pollando kaj Ĉinio. La kvanto da legitaj verkoj sumas je 14796 kaj pli ol miliono da paĝoj.

Hori Jasuo, Japanio

## AMO 106 okazos ekde la 21-a de decembro en Togolando

La seminaria temo estas: 'Esperanto kaj Mono'; ĝi okazos en Instituto Zamenhof en Lomeo. La gvida teamo estas:

ATTAGLO Kokou Evienyeame: Prezidanto de UTE

GBEGLO Koffi: Administranto de ACE kaj kasisto de UTE

DOUMEGNON Koffi: Estro de la komitato de UTE

Pliaj temoj: KASETO (Kajero de seminarioj en Togolando en 2021 kaj 2022)

La koro kaj funkciado de Instituto ZAMENHOF

Afrikecigado de Afrika Agado, evoluigo de afrika financado

Kuracado perherba kiel fontoj de enspezoj

Verki por Esperanto-periodaĵoj

Esperanto kaj Komerco, la rolo de la ekonomia faka asocio IKEF

===== vortoj: 1285 =====

**La kolekto de EKO por 2023:** <https://www.ilei.info/agado/EKO.php> (ĝis 60).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunajo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.

Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.